

KATALUNA ESPERANTISTO

MONATA GAZETO

Organo de la KATALUNA ESPERANTISTA FEDERACIO
kaj de la INTERNACIAJ FLORAJ LUDOJ

Una data: **9 juny 1935**

Un lloc: **RIPOLL**

Un esdeveniment:

XVII CONGRÉS ESPERANTISTA CATALA



JANUARO-FEBRUARO 1935

N-ROJ 212-213

700074-B

Esp

Hi ha una manera indirecta de protegir la
FEDERACIÓ ESPERANTISTA CATALANA:

Comprar les coses que ella patrocina.

Kataluna Antologio

(segona edició)

Antologia de poetes i prosistes catalans en Esperanto. - 416 pàgines de text. - Preu: 10 pessetes.

Primer Manual de la Llengua Auxiliar Internacional Esperanto

Edició de 4.000 llibrets al preu de 25 cèntims exemplar. - Comandes des de 25 exemplars, 20^o/o de descompte.

Zamenhof-disko

Disc fonogràfic amb la veu del Mestre, impressionada amb motiu del 5.^e Congrés Universal d'Esperanto a Barcelona 1909. L'únic disc al món que guarda la veu de l'autor de l'esperanto. (Esgotat)

Curs Complet de la Llengua Auxiliar Internacional Esperanto

per Jaume Grau Casas. Gramàtica i Vocabulari Esperanto-Català, 170 pàgines. Preu: 3'50 ptes. Descomptes als grups i revenedors.

Adreceu-vos a

CARRER VALENCIA, 245 - BARCELONA



KATALUNA ESPERANTISTO

OFICIALA ORGANO

DE LA

KATALUNA ESPERANTISTA FEDERACIO
KAJ DE LA INTERNACIAJ FLORAJ LUDOJ

JARABONO:

Eksterlande: 4 pesetoj
Enlande: 3 pesetoj

ADRESO:

València, 245 - BARCELONA

OFICIALA ANGULO

Niaj eldonoj

Lastan septembron, dank'al la financa helpo de kelkaj amikoj de K. E. F. ni povis publikigi la katalunan gramatikon de Jaume Grau Casas «Curs Complet». Tiu verko solvis la unuavican problemon de niaj propagandistoj, kiuj longe batalis por la akiro de taŭga kursmaterialo. Ni ne pretendas, ke la problemo ricevis plenan solvon, por kio mankas ankoraŭ vortaroj, propagandiloj kaj praktika libro por kursdaŭrigoj. Tiu komplementa materialo povos elveni, se nia eldonita gramatiko trovos vastan subtenon kaj multan aĝeton. Tial la plej efika kunlaboro en tiu grava ĝenerala tasko estas en la mano de ĉiu esperantisto kaj precipe en tiu de la grupoj: uzu kaj diskonigu la «Curs Complet».

Alia eldonaĵo de K. E. F. postulanta baldaŭan elĉerpigon estas «Primer Manual», kiu pro sia malalta prezo estas tre taŭga por disdonado okaze de prelegoj kaj propagandkunvenoj. Niaj propagandistoj ne forgesu tiun broŝureton sur kies paĝoj reliefigas la simpleco de nia lingvo, tiel alloga por tiuj personoj, kiuj simpatias al la ideo de lingvo internacia.

Intertempe nia Eldona Fakto, interkonsente kun U. E. A., preparas la eldonon de «Kataluna ŝlosilo». Ni esperas, ke post kelka tempo tiu projekto estos fakto. En baldaŭa tempo ni povos havigi al la kataluna esperantistaro tiun valoran

broŝureton je tre malalta prezo. Jen vasta horizonto sur la propaganda kampo. Iom da helpo venu al ni de ĉiu flanko kaj la tuta afero glate disvolviĝos.

Speciala kurso por profesoroj

Kun granda sukceso komenciĝis la dek-duan de januaro la kurso organizita de K. E. F. kun la celo havigi al nia enlanda movado pli grandan nombron da profesoroj de Esperanto. Sub la gvido de profesoro Delfi Dalmau. L. K. dudek-kvin esperantistoj daŭrigas siajn studojn, kaj espereble la plimulto sukcesos profesoriĝi. Kiuĵ vidas en Esperanto nur tempopasigilon, tiuj povos konstati, ke ĝi estas fonto de altnivelà kulturo, kiu malkovras la sekretojn de nacia lingvo kaj konigas la trezorojn de artefarita lingvo.

La kurseto daŭros ĝis la fino de marto proksimume.

Por la bono de U. E. A.

Se unu el la unuaj devoj de la esperantistoj estas subteni la landan Asocion, la dua sendube estas subteni la Universalan. K. E. F. havis ĉiam plej amikajn rilatojn kun U. E. A. sed nun, post la Interkonsento de Kolonjo, U. E. A. estas K. E. F. mem, ĝi estas antaŭ la mondo la plej alta reprezentanto de nia movado. U. E. A. havas antaŭ si tre malfacilan vojon, al kiu kondukis ĝin la antaŭa konstanta deficitito kaj la suferata tutmonda krizo. Ni havas la devon meti for de ĝia vojo la multajn trabojn barantajn ĝin. Ĉiu nova aktiva membro forigas unu trabon. Ni havas la moralan devon helpi la unuan esperantistan instancon en tiu ĉi speciala kriza situacio. Niaj membroj estas petataj fariĝi aktivaj membroj de U. E. A. Per tio ili pruvos sian amon al nia movado kaj la deziron alporti sian ŝtonon por la rekonstruo.

Grava akcidento de la Direktoro de UEA

Depost la Kongreso de Stokholmo la Direktoro de UEA, Sro. Robert Kreuz, estas ege okupita pri la plena reorganizo interna de UEA kaj de ĝia Centra Oficejo, en kunlaboro kun la Estraro de UEA. Sekve de trostreĉa laboro Sro. Kreuz malsaniĝis grave pro nerv-akcidento surstrate, irante hejmen de la oficejo tre malfrue. Post tri malfacilaj tagoj li estas nun ekster danĝero, sed devigita resti en lito por restarigo. Li jam statas pli bone, cetere laŭpove direktas la ĉefajn aferojn el la lito. Li mem esperas, post nelonge denove plene plenumi sian gigantan laboron.

Un greu error

No hi ha dubte que la llengua internacional Esperanto està en vigílies d'imposar-se.

No podríem dir com ni de quina manera serà; però tots els símptomes, totes les noves que ens arriben de pertot arreu fan creure que aviat prendrà un gran increment, el qual s'accelerará o s'endarrerirà segons la forma d'endegar la seva propaganda.

L'aspecte simptomàtic actualment més important és la part directa que les autoritats prenen en el foment de l'Esperanto als països asiàtics i als orientals i septentrionals d'Europa.

Fóra un gran què per a l'Esperanto i, per tant, per a la humanitat, que els governs de tots els Estats es decidissin d'una vegada a deixar el pas lliure a un dels més grans progressos per a la felicitat dels homes, en el temps i en l'espai; però si els governants no es decideixen a fer-ho, si s'hi oposen o li fan el buit, aleshores que no es gloriegin des de l'alt seti en què el talent, la sort o el favor els ha col·locat, quan el poble, en un dels moments d'immensa inspiració de què de tant en tant dóna proves, prengui pel seu compte la implantació de l'Esperanto i exigeixi el seu ensenyament a totes les Escoles on van els seus fills.

Hem dit que l'Esperanto és un dels més grans progressos de la humanitat i no ho hem dit en va. Recordeu, sinó, la importància del descobriment d'Amèrica i d'Oceania, per què va augmentar el volum de la humanitat coneguda; recordeu quan Champolion va trobar la clau per a desxifrar els jeroglífics egipcis en llegir la pedra de Roseta, la qual cosa va permetre a les actuals generacions conèixer altres generacions mortes i enterament oblidades; recordeu, encara, l'invent de Gutemberg, en virtut del qual el pensament humà va poder multiplicar-se i fou possible que les especulacions de la ciència esdevinguessin assequibles al poble. Doncs bé; aquests grans descobriments històrics, que Flammarión va qualificar de *genesíacs*, no són altra cosa, socialment parlant, que els precursors de l'obra genial del Dr. Zamenhof, de la mateixa manera que les ones hertzianes són les precursoras de l'invent de Marconi.

Què en trauria la humanitat d'engrandir-se, de conèixer el seu passat històric i que avui hi hagués més savis que

ahir, si els membres d'aquesta humanitat es captinguessin com forasters?

¿I què diríem, si les empreses industrials i científiques no haguessin divulgat la telegrafia sense fils i la radiotelefonía, de l'actitud passiva de les autoritats, que no han fet res més que aprofitar-se'n, de la mateixa manera, que demà s'aprofitaran de l'Esperanto?

Un fet inqüestionable és que els governants, davant d'una innovació transcendental, en general resten passius; que les entitats científiques i industrials unes vegades s'interessen i d'altres no per la ràpida efectivitat d'un progrés; doncs, quan no ho fa ningú més, no queda altre remei que fer-ho el poble. I el poble ho fa sempre en un moment d'inspiració. I aquest moment d'inspiració sempre és l'obra dels capdavaners d'un progrés.

Es per això, que avui volem cridar l'atenció dels actuals esperantistes per tal d'ajudar-los en la seva comesa, aclarint la incògnita de la dissortada qüestió que un gran talent, però ofuscant o megalomaniac o ambiciós, va plantejar ja des del començament de la vida pública de l'Esperanto.

L'Esperanto només és una llengua? Sí? No?

Si girem l'esguard als països que han estat oprimits, i és un fet innegable que l'opressor sempre imposa la seva llengua (quan no ho fa és que deixa d'ésser opressor, és que vol ésser amic), veurem com, en redreçar-se i depurar-se les llengües vernacles, de bell començament es troben com eixalades i cerquen, un per un, els substituïts dels mots intrusos; però del moment que el poble, lliure del jou i de la imposició d'una llengua forastera, sent com a poble i pensa amb la seva llengua, ja no té necessitat d'emprar els esmenats substituïts ni els calcs dels girs de llenguatge que també s'havien introduït i, en canvi, presenta una riquesa sintàctica ben característica i exclusiva. En el primer cas aquell poble, al qual havia estat imposada una altra llengua, conserva encara aquella llengua amb un segon joc de paraules; en el segon, ja té la llengua pròpia, ben diferent de totes les altres. I és que la llengua és la resultant del pensar, del sentir i del voler d'un poble. Amb uns altres mots: *és la manifestació espontània de l'ànima lliure del poble.*

Si una llengua vernacle natural no fos més que una llengua, i no l'expressió de la part mental de la idiosincràsia d'un poble, amb la més gran facilitat s'assimil·laria una llengua forastera qualsevol. Hom no hauria de fer més que canviar uns

mots per uns altres i tot seguit es faria entendre. Però la realitat és ben altra, perquè a cada poble que parla una llengua diferent també li correspon una idiosincràsia diferent. Ací radica la dificultat de trobar substituïts dels mots quan un hom pensant i sentint amb la idiosincràsia del seu poble vol parlar amb la llengua d'un altre.

Vegem ara què passaria si l'Esperanto només fos una llengua i no, com reiteradament digué el seu autor, un nou sentiment que havia d'agermanar els homes, fent que es consideressin com a tals i no solament com a francesos, italians, espanyols, etc.

¿Qui dubta, en el cas de considerar l'Esperanto només com una llengua, que cada individu o cada poble tindria cura d'espigolar de l'Esperanto tots els mots equivalents als de la seva parla i que els ordenaria de la mateixa manera com en tenia el costum?

¿Què passaria, suposant que tots els pobles hi trobessin aquells mots equivalents, quan tothom parlés l'Esperanto?

Doncs passaria que cada poble s'hauria fet un segon joc de paraules i, encara que minvades, es trobaria amb les mateixes dificultats que abans en parlar amb un estranger.

Però en aprendre l'Esperanto sorgeix una dificultat natural: hom no hi troba els substituïts a tots els mots de la llengua nadiua. I, oh, paradoxal!; els bons esperantistes s'entenen perfectament i poden expressar mil matisos del pensament i una infinitat d'idees que no expressarien amb llur llengua.

I és que l'Esperanto no és solament una llengua; és també una idiosincràsia; és el sentiment de l'harmonia social, és un sentiment de germanor i de pau que el caracteritza i que no podrà mancar-li, perquè, altrament, no prosperaria.

Estan en un greu error, doncs, els qui s'entesten en el fet que l'Esperanto només és una llengua, perquè negar-li una idiosincràsia i una espiritualitat és negar-li l'ànima, és negar-li la vida.

I aquesta espiritualitat, precisament, serà la que inspirarà el poble en una de les seves més grans gestes.

SAMUEL ROCA I RODÓ

Barcelona, 6-1-1935.





KONGRESAJ INFORMOJ

La Organiza Komitato en Ripoll, sub la gvido de nia fervora samideano Antoni Planas, daŭrigas sian taskon por havigi al la kataluna esperantistaro sukcesan Kongreson. Ni estas certaj, ke nia XVII estos nova brila festo de la katalunaj esperantistoj, kiuj novafoje havos okazon konstati kiel entuziasme kaj fervore laboras niaj kunbatalantoj en ĉiuj katalunaj lokoj.

Interkonsente kun la komitato de K. E. F. la Organiza Komitato kunmetis la jenan provizoran kongresprogramon.

Dimanĉon, la 9-an de junio: Matene, je la 11-a, alveno de la gekongresanoj, akcepto ĉe la Urbdomo kaj Malfermo de la Kongreso. Posttagmeze, je la 4-a, Solenaj Floraj Ludoj. Nokte, Balo.

Lundon, la 10-an de junio: Vizito al la ĉefaj historiaj monumentoj, laborkunsido kaj fermo de la Kongreso. Oficiala Festeno. Posttagmeze: Koncerto, dancoj kaj teatraĵo.

Mardon: Ekskursoj.

Se per si mem la programo ne estus alloga, rememoru, ke Ripoll sidas en unu el la plej belaj katalunaj regionoj, kie la naturo verŝis sian tutan majeston kaj belecon. Altaj montoj ĉirkaŭ ĝi, kun antikvaj kasteloj, kiuj parolas pri malnovaj epizodoj el nia historio, kaj super ĉio la fama Monaĥejo Sankta Mario, fondita de Guifré I, la unua grafo-reĝo de Katalunujo, kies artvaloro estas ekster kalkulebleco.

Niaj proksimaj numeroj de KATALUNA ESPERANTISTO havigos al vi diversajn informojn pri vojaĝ—kaj hotelprezoj, cetere tre malaltaj. Ni estas certaj, ke la nunjara kongreso de la katalunaj esperantistoj superos je ĉiuj vidpunktoj ĉiujn antaŭajn. Por tio ni kalkulas je la neelĉerpebla entuziasmo de niaj kunbatalantoj, kiuj novafoje pruvos kiom ili amas la esperanton.

Ni konstante propagandu por la sukceso de nia XVII!

XXVII UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

La 26-a Universala Kongreso de Esperanto en Stockholm unuanime kaj entuziasme akceptis la inviton de Itala Esperanto-Federacio okazigi la 27-an en Roma en aŭgusto 1935.

Patronado. Jam la potenca Asocio «Touring Club Italiano» bonvolis akcepti eniri la Patronadan Komitaton. Tiu granda Asocio estas jam simpatie konata inter la tutmondaj esperantistoj pro la belega traduko de la gvidlibro Milano kaj Lago de Lombardio.

Loka Kongresa Komitato. Tial ke, krom la ĉefaj Kongresaranĝoj en pluraj urboj, kaj la tuta organizo (Universala Kongreso—Somera Universitato—Kongresa Krozado al Afriko) havos nacian amplekson, la LKK konsistos el la Direkta Komitato de Itala Esperanto-Federacio mem, plus aliaj membroj el la Nacia Komitato de Itala Esperanto-Federacio kaj el la ĉefa Kongres-urbo.

Organiza Oficejo. Estos Organiza Oficejo de la 27-a: «Esperanto-Centro Itala», sidejo de IEF kaj centro de la itala Esperanto-movado. — Ĉiun korespondadon, dokumenton, kaj mensendon koncernantan la Kongreson bonvolu adresi nur al:

Esperanto-Centro Itala, Galleria Vittorio Emanuele 92, Milano (Italujo).

Poŝtĉeka konto: Esperanto-Centro Itala, Milano, N. 3.18715.

Kotizoj: Baza kotizo por aliĝo: Liroj 100.—Estas konsentitaj favor-kotizoj por familianoj kaj junuloj, detale montritaj en la aliĝilo. Granda rabato por fruaj aliĝoj, maks. 30 %.

Datoj de la Kongreso. Jen la ĉefaj tagoj de la Kongresaj Aranĝoj:

En Firenze: 3 aŭg. 1935, malfermo de la *Somera Universitato*.

En Roma: 5 aŭg. 1935, *Solena Malfermo de la Kongreso*.

En Roma: 7 aŭg. 1935, ĉefaj kaj fakaj kunsidoj, Internacia balo.

En Napoli: 9 aŭg. 1935, *Granda Kongresa Ekskurso*.

En Napoli: 10 aŭg. 1935. Fermo de la Kongreso. — Komenco de la Kongresa Krozado al Afriko.

En Genova: 17 aŭg. 1935, fino de la Kongresa Krozado. — *Fermo de la Somera Universitato*.

ESPERANTO EN LA PRAKTIKON!

Facile tion deziri, diri kaj peti. Sed malpli facile tion efektiviĝi.

Dum la Viena Konferenco, teknikistoj priparolis, pristudis la aferon, ĉiuj disiris firme celante klopodi por efektiviĝo. Sed bedaŭrinde ĉiuj aferoj devas maturiĝi, kaj bonaj kondiĉoj estas necesaj, favoraj cirkonstancoj necesas, por tiu maturiĝo, kaj ĉefe por ke ĝi okazu rapide kaj profunde.

Do la unua agado de ni efektivigota estas okazigi favoran atmosferon. Sen tia atmosfero, Ministro ne konsentas, Direktoro de Entrepreno ankaŭ ne; eĉ petontoj ne kuraĝos peti, se ili antaŭsentas ke ili petos en dezerto.

Por okazigi favoran atmosferon la geesperantistoj devas esti tiel kuraĝaj kiel saĝaj. Kuraĝaj uzi kaj klarigi Esperanton ĉiam, kiam tio estas nun eble pere de niaj organizoj: konante ilin, partoprenante ilin kaj utiligante ilin. Saĝaj ne troigi, ne mensogi. Hodiaŭ ni ne bezonas troigi, ĉar vere Esperanto povas jam multe utili se ni profitas la servojn de niaj enlandaj kaj interlandaj Organizaĵoj, librojn, gazetojn, k. c. Antaŭe ni ne bezonis mensogi, ĉar Esperanto ĉiam estis mirinda lingva solvo kaj noblega nova sento. Neniam mensogo aŭ simpla troigo estas necesaj, sed kontraŭe ili ĉiam estas maldecaj. Afero estas bona aŭ ne; se ĝi estas malbona ni ne devas propagandi ĝin. Se ĝi estas bona sufiĉas diri la veron.

Se esperantisto estas profesoro, ekzemple, plej bone efikos per seriozaj aludoj al la reguleco de Esperanto. Se li estas komercisto, li uzu laŭeble plej ofte Esperanton por informoj. Se li estas verkisto, li utiligu la naciajn antologiojn en Esperanto, la mirindajn tradukojn el famaj verkistoj Racine, Dante, Goethe, k. c. Ĉiuokaze li povas legi Esperantan gazeton aŭ libron, kiel ordinaran informilon aŭ plaĉilon. Antaŭ kelkaj tagoj en interparolado, ni estis kvar altlernejaj profesoroj. Ĉiuj eldiris ke estas neeble certiĝi kaj senpartie opinii, pri la nuna stato de Ruslando. Unu el ili asertis ke ne konante la rusan lingvon estas senutile iri al tiu lando por intima informiĝado. Tiam mi respondis ke se mi havus tempon kaj monon, nesciante rusan lingvon, mi povus intime esplori la staton de tiu proletarregima landego. Miaj kolegoj iom miris pri mia aserto. Mi aldiris ke per Esperanto oni povas interparoladi, fratece interbabiladi, kun senfine da rusoj. Tio pen-

sigis al tiuj kolegoj pri utileco de Esperanto. Post tiu aludo, kiam oni proponos al ili lernigadon de Esperanto en ties respektivan lernejon, ili ne tiel seninterese kaj senscie respondos pri enprogramigo de Esperanto.

Unuvorte, ni profitu ĉiun okazon utili al la internacia lingvo kaj ĝin utiligi. La amasoj ofte nur interesigas pri tio, kio aperas *utila*, tuj profitiga. Kaj ne malofte ministro, direktoro kaj ceteraj altranguloj estas, spirite, simplaj amasanoj.

Nek iluziigo, nek seniluziigo! Ni ne povas ŝanĝi per nia nura deziro la mondon, la kutimon, la direkton de ĉiuj aferoj. Sed ni devas esti certaj ke ni povas multe influi per konstanta ekzempla agado.

Sukcesan *frapon* ni povas certigi nur tiam, kiam frukto jam bone naturiĝis por nia celo. Antaŭtempa frapo ofte malsukcesigas!

Nuntempe ni povas kaj devas konstante agadi per kreado de favora atmosfero. Sed ankaŭ ni devas kuraĝi frapi ĉiam, kiam okazo estas favora!

DELFI DALMAU

Leo Belmont kaj lia duonjarcenta literatura agado

Leo Belmont!

Kun granda estimo kaj profunda sento mi elparolas la nomon de tiu ĉi homo, batalanta kuraĝe la tutan vivon kontraŭ ĉiuj malnobleco kaj perforto, defendanta ĉiun progreson kaj liberecon, iranta ĉiam la vojon de vero kaj justeco...

Kun admiro mi rigardas lin, kiu malgraŭ malfacila sorto kaj multaj doloraj travivaĵoj neniam malfideliĝis al siaj konvinkoj kaj idealoj, kvankam sur sia vojo li sentas sin ofte soleca.

Kun dankemo mi pensas pri li, kiu pliriĉigis la polan literaturon per pli ol cent verkoj, kiu alparolis la polan publikon per centoj da poemoj, kiu klarigis multajn diversajn filozofiajn kaj sociajn problemojn per amaso da prelegoj.

Poeto, novel—kaj romanverkisto, humoristo, satiristo, tradukisto, publicisto, oratoro, konanto de la franca, germana kaj rusa literaturoj, advokato, liberpensulo, batalanto de progresidealoj, esperantisto—jen bildo de tiu ĉi homo, pri kiu

la fama pola scienculo, prof. Ignacy Radlinski, diris: «Se talentojn, kiujn posedas la riĉega naturo de Belmont, dividi ni povus inter dek homojn, ni havus je dek eminentaj verkistoj pli en multaj sferoj».

Li naskiĝis en Varsovio, la 8-III-1865, tie lernis, tie finis jurfakon en la Varsovia Universitato, tie komencis sian literaturan agadon. En 1892 post studfino li forveturis al Petersburgo—nuna Leningrado—, kie li laboris kiel advokato, ne ĉesante okupiĝi pri la literaturo. Dekdu jarojn poste li revenis Varsovion, kie li establiĝas por ĉiam, daŭrigante la advokatan kaj literatur-jurnalistan agadojn. En 1907 li fondis semajnan revuon «Wolne Slowo»—«Libera Vorto»—, kies redaktoro kaj sola kunlaboranto estis li mem. Erudito en multaj fakoj, li scipovis facile per sia genia plumo respondi al diversaj aktualaj politikaj, sociaj, literaturaj kaj filozofiaj demandoj. La rusa registaro, kontraŭ kiu Belmont skribis artikolojn en «Wolne Slowo»—ofte en formo de bonega satiro—, persekutis lin, monpunadis, malliberigis kvinfoje kaj fine en 1913 malpermesis eldoni plu la revuon. Krome la rusa registaro forprenis de li la advokatajn rajtojn—redonis ilin al Belmont la reviviĝinta Polujo.

La pola publiko ekkonis lin, kiel poeton, en 1884, kiam en la revuo «Swit»—«Tagiĝo»—, redaktita de Marja Konopnicka, aperis lia unua poemo «Plendo de virino». Dekses jarojn poste li eldonis trivoluman poemaron «Rimoj kaj Ritmoj», en kiu li tuŝas filozofiajn kaj sociajn problemojn, kaj en kiu multaj lirikoj respeguligas liajn mondkoncepton kaj malgajan animon. La tria volumo enhavas tradukaĵojn el fremdlandaj poetoj—. En 1902 aperis en lia pollingva traduko «Eugeno Onegin» de Puŝkin, opiniata de polaj kaj rusaj kritikistoj kiel «majstroverko de la tradukliteraturo».

Multe legataj estas liaj kriminalromanoj, ekz. «La proceso ĉe la fermita pordo», «Inter juĝejo kaj konscienco», «La diablino»; tre interesaj estas liaj historiaj romanoj, inter kiuj mi nur citu «Mary Vetsera», «Tragedio de Habsburgoj», «Markizino Pompadour», «Sinjorino Dubarry», «Morto de Messalina»; intereson vekas liaj multnombraj noveloj, kies nur parto aperis en formo de libro s. t. «Noveloj kaj satiro».

Belmont ŝatas batali per satiro, kaj kiel satiristo li estas majstro. Sian majstrecon li pruvis en la bonega satira verko «La homo, pri kiu la mondo ridas». En tiu ĉi romano, kreita sur la fono de «Cirko» de Charlie Chaplin, la aŭtoro skribas ofte kun humoro pri diversaj maljustaĵoj en la mondo,

sed en tiu ĉi lia humoro oni bonege sentas la melankolian kaj dolorplenan animon de Belmont.

La nomon de Belmont konas la esperanta publiko ekde la unuaj momentoj, kiam aperis la unua lernolibro de «Lingvo Internacia», kies aŭtoro estis doktoro Esperanto.

Belmont, 22-jara studento, trastudinte en septembro 1887 la lernolibron, sendis unu monaton poste al la Majstro entuziasmoplenan esperantlingvan leteron, en kiu li skribis la profetajn vortojn: «Vi venkos, Sinjoro, vi venkos!»

Estas li, kiu la unua post dr. L. L. Zamenhof skribis originalajn esperantlingvajn poemojn, kreante Esperantan poezion; estas li, kiu la unua tradukis esperantajn poemojn de Dr. L. L. Zamenhof kaj tiujn ĉi de Grabowski pollingven, konatigante la polan publikon kun originala Esperanta poezio.

Memorinde, ke en 1905 dum la I Kongreso en Boulogne-sur-Mer li ĵetis la proponon kunvoki ĉiujare Esperantajn kongresojn; ke li propagandis nian lingvon pere de «Wolne Slowo», kies redaktoro kaj eldonanto li estis, pere de multaj artikoloj en pola, kaj esperanta gazetaro; ke li fervorigis la publikon al Esperanto per multaj belegaj prelegoj.

Ĝis hodiaŭa tago li, entuziasmulo, konvinkas la homojn pri bezono de la lingvo Esperanto, ĝis hodiaŭa tago li ornamas ĉiujn niajn solenojn per sia belega parolado.

Konsiderinte liajn meritojn sur Esperanto-kampo, la Esperantista Akademio invitis lin sia membro.

Ni, polaj esperantistoj, estas fieraj, ke Leo Belmont vivas inter ni kaj laboras kun ni.

Duonjarcenton li laboras sur literatur-ĵurnalista kampo, preskaŭ duonjarcenton de sia vivo li oferis por nia movado!

HALINA WEINSTEIN

Varsovio en decembro 1934.

Leo Belmont.

HO, SE NUR TIO ESTUS LA VERO

Ho, se nur tio estus la vero,
Ke la feliĉo regas ĉiele.
Por hom' travivi ĉion sur tero,
Tiam ne estus tiel kruele.
Dum vivbatalo, peniga sorto
Ĉiu konsentus koron disŝiri,

Ke li nur povu poste, post morto
En la ĉielo pacon akiri...

El pola originalo tradukis
HALINA WEINSTEIN

(Aperinta en «Rimoj kaj Ritmoj», 1900).

LA AMIKINO

Mi memoras... en lernejo
Ni vivis en amikeco,
Ŝi ĉiam kun mi dividis
Turmentojn de l'infaneco...

Kaj poste min akompanis
En vivo tra nokt' malhela...
Dividis kun mi dolorojn
Kaj zorgojn ŝi, la fidela...

Kaj kiam mi edziniĝis,
En edzan hejmon mi iris, —
Ŝi, gasto mia, la ĝojon
Dividi kun mi deziris...

En amikeco ĉi pura
Neniam falso eksonis;
Ŝi pensojn kun mi dividis
Kaj sentojn — ilin ŝi konis...

Do kial en rememoroj
Pri ŝi mi pensas dolore? —
Ĉar mi sciigis, ke... edzon
Dividas kun mi tutkore!

El pola originalo tradukis
HALINA WEINSTEIN

(Aperinta en «Rimoj kaj Ritmoj», 1900).

VORTLUDO

Diras la instruistoj: En granda la Homero
Estis multo da homoj. Ĝi eble estas vero,
Sed al esperantisto pli grandaj estas veroj:
En ĉiu homo estas multego da hom'eroj!

(Aperinta en «Sonoj Esperantaj» de Leo Belmont, 1908.)

(Originala esp poemeto.)

VESPERO

La vesper' trankvile venas,
Brilas klare la Vener'...
Noktangel' teron benas,
Benas ĉion sur la ter'...

De florspiro sin enplenas
Per dolĉeco la aer'...
La vesper' trankvile venas,
Brilas klare la Vener'...

Najtingaloj gardon tenas,
Kantas ame dum vesper'...
Noktangel' teron benas,
Benas ĉion sur la ter'...

Kial nur en mi sin tenas
La venteg' kaj malveter' ?...
De florspiro sin enplenas
Per dolĉeco la aer'...

Kial koro sin enplenas
Per sopiro kaj sufer' ?...
Najtingaloj gardon tenas,
Kantas ame dum vesper'...

La animon ĉirkaŭĉenas
La dolor' kaj la koler'...
De memoro ne elvenas
La ofend' kaj la malver'...

Mi forgesi vane penas,
Kiel falas la liber'...
Kiel hom' al homo prenas
La liberon per la fer'...

Ĉie forto gardon tenas
Kaj triumfas memafer'...
La esper' de mi devenas
Kaj estingas eĉ fajrer'...

Tiu ĉi profiton prenas
Sen laboro, sen ofer'...
Tiu tage, nokte, penas
Por grajnero, por akver'...

La mallumo min enplenas
 Dum ĉi tiu belvesper'...
 La vesper' trankvile venas,
 Brilas klare la Vener'...

Mia sorto min malbenas
 Por sendormo, por mizer'...

Noktangel' teron benas,
 Benas ĉion sur la ter'...

(Aperinta en «Sonoj Esperantaj» de Leo Belmont, 1908.)

Tiu ĉi poemo estas originale verkita en Esperanto.

BIBLIOGRAFIO

«Per kio ni amuzu nin?» Societo-kaj dancludoj.
 De Jakob Rosenberg kaj Ernfrid Malmgren.

La tri unuaj numeroj de la tre valora serio de praktikaj manlibroj eldonata de Sveda Esperanto-Federacio pritraktis la seriozan laboron de la Esperanto-grupoj. Sed ni devas ne nur labori, sed ankaŭ amuziĝi. Se la grupkunvenaj programoj ofte estas tre «malgrasaj» rilate al propaganda kaj instrua laboro, ili ofte estas senenhavaj rilate al amuzigo de la grupanoj. Ni ne estu ĉiamaj gravmienuloj, ĝojo kaj gajo regu en la esperantistaj rondoj — post la laboro.

Plej valoraj estas amuzajoj, kiujn partoprenas la anoj mem. Ne nur komuna kantado estas ĉiam praktikinda, sed ofte oni povas aranĝi ankaŭ societoludojn aŭ liberaerajn ludojn. En tiaj okazoj la libro de Rosenberg-Malmgren estas valora helpilo. Se oni uzos la enhavon de tiu libro, oni «lernas dum oni amuziĝas».

Ĉiu volumo kostas 1 sv.kr. Ili estas riceveblaj ĉe Eldona Soc. Esperanto, Poŝtfako 698, Stockholm 1.

La Espero kaj La Tagiĝo sur gramofondisko.

La plej multe konataj kaj ŝatataj esperantaj kantoj, La Espero de D-ro Zamenhof kaj La Tagiĝo de Antoni Grabowski nun estas haveblaj sur gramofona disko eldonita de Eldona Societo Esperanto, Stockholm. Prezo sved. kr. 3:50.

La diskon surkantis juna sveda operetkantisto Gösta Kjellertz. La vigla takto donas vivon kaj entuizasmon al la kanta-

do. Certe tiu disko ne nur ĝuigos niajn samideanojn, sed ĝi ankaŭ instigos al pli ofta kantado, precipe en grupaj kaj publika kunvenoj. Kun vera ĝojo oni devas saluti tiun novan diskon, kiu tre longe malestis.

Marŝalo Jozef Pilsudski, libro bonpapera, bonteksta, interesa moderna historio de Polujo baze de biografio de la nuna pola ŝtatestro Marŝalo Pilsudski.

La aŭtoro de tiu verko estas fama pola aŭtoro Waclaw Sieroszewski, prezidanto de Pola Literatura Akademio, kiu permesis esperantan tradukon al Mgr. Fil. B. Strelczyk, kiu siavice bone plenumis la taskon.

Tre ŭtila verko por ĉiuj, kiuj interesiĝas pri la nuntempaj politikaj problemoj kaj historio, kies tradukon eldonis Pola-Esperanto Asocio, per tio utiligante pli kaj pli nian internacian lingvon. Plej bona argumento por esperanto estus, ke per ĝi ĉiuj sciemuloj povus legi ĉion eksterlandan, kio estas grava, interesa aŭ plezuriga.

Vic. — Interesa faldprospekto eldonita de «Sindicat de Turisme» de la nomita urbo. Bona papero, belaj desegnoj kaj interesa enhavo pri la ĉarma kataluna urbo, kiu per tio novafoje surpaŝas la internacian kampon de turisma propagando. Interesuloj povas ricevi la prospekton senpage post peto al la eldoninto.

ENLANDA MOVADO

Vic. — Nia Esperanta-Grupo ne indiferece preterpasis la 75-an datrevenon de la naskiĝtago de Dro. Zamenhof. Tiu memorinda dato estis ĉe ni ankaŭ solenata kiel ĉe la tuta esperantista mondo, publike elmontrante niajn elkorajn sentojn. En la plej videbla montra fenestro de librejo «Montserrat», de nia samideano Sro. Joaquim Gafas, ni prezentis la artan buston de nia Majstro (verko de la fama artisto Sro. J. Claret, nun loĝanta en Parizo) ornamitan per verdaj laŭraj branĉoj. Ĝi altiris la atenton de multnombra publiko kaj de la preterpasantoj antaŭ tiu multfrekventata librejo.

La saman tagon vespere, ĉe nia grupejo kaj sub prezido de bronza bildo de Dro. Zamenhof ĉirkaŭata per laŭrbranĉa krono, okazis intima festo kun diversaj paroladoj, el kiuj

estas rimarkindaj tiuj de niaj grupanoj Sroj. Tomàs Moreta kaj Miquel Parareda, kiuj per entuziasmoplenaj vortoj instigis la ĉeestantaron daŭrigi kun la sama fido kaj persisto, kiujn al ni lernigis la glora homo, kies naskiĝtagon ni festis.

Per dolĉaĵoj kaj ĉampano oni regalis la ĉeestantojn. Oni aŭdigis la voĉon de la Majstro sur gramofondisko kaj diversajn muzikaĵojn kaj la festo finiĝis per vigla balo.

Barcelona. — Kun granda sukceso okazis en la sidejo de Paco kaj Amo la tiel nomata Festo de la Libro por soleni la 75-an naskiĝtagon de Dro. Zamenhof. Sub la prezido de samideano S. Alberich, prezidanto de K. E. F. parolis en la nomo de diversaj lokaj grupoj samideanoj Coll, Navarro, Giralt, Banet, Fernández, Vilá, Anglada kaj Roca. Partoprenis multaj esperantistoj kaj regis granda entuziasmo.

—Sub la gvido de samideano R. Fernández komenciĝis la 15-an de januaro nova kurso en la sidejo de Kooperativo «La Lleialtat». Partoprenas 25 lernantoj.

—En la sidejo de Acadèmia Enciclopèdica «Espero», la 22-an de decembro okazis esperantista vesperfesto je la profito de samideano Albert Mas, kiun bedaŭrinde minacas danĝera malsano. Partoprenis reprezentantoj de diversaj grupoj. En la nomo de la K. E. F. parolis samideano Samuel Roca, kiu entuziasme vokis ĉiujn al kunagado en la vicoj de la Federacio. Rimarkinde ke la grupo «Espero» decidis aligi siajn membrojn al K. E. F.

Terrassa. — La malnova grupo «Lumon», kiu lastatempe baraktis en interna krizo pro politikaj tendencoj de kelkaj membroj, kiuj ekzigis, reprenis sian iaman kuraĝon kaj fervoron. De la komenco de la jaro ĝi publikigas kvarpaĝan bultenon, tra kies paĝoj fluos la tradicia entuziasmo de niaj terrassaj kunbatalantoj.

La Lyon'a Foiro ĵus eldonis novan afiŝon. — Nia gazeto ricevis ekzempleron de la nova esperantlingva afiŝo de la Lyon'a Foiro. Ĝi estas trikolora kaj mezuras 60 cm. × 1 m. Post kelkaj tagoj la Lyon'a Foiro eldonos ankaŭ novajn tripaĝajn artajn prospektojn en Esperanto. Por senpage ricevi la afiŝon kaj la prospekton, oni skribu al: Foire de Lyon, Esperanto Fako, Rue Mènestrier, Lyon, Francujo.

Mayoral-Pensiono

SITUANTA EN LA CENTRO DE LA URBO

Gvidas: E. CAPDEVILA

Bonega komforto — Pli ol 50 ĉambroj kun varma-malvarma fluanta akvo. — Telefono en ĉiu ĉambro — Centra hejtado.

Taga pensio, 13 pesetoj

ONI PAROLAS ESPERANTE

Rambla del Centre, 21-27
Plaça Francesc Macià, 1-2
(Enirejo tra strato Colom, 3)

BARCELONA
Telefono 14680

Curs Complet de la Llengua Auxiliar Internacional Esperanto

per Jaume Grau Casas

*La millor gramàtica en català
de la llengua Esperanto. Em-
pren-la en tots els curssets!*

Preu: 3'50 pessetes

Adreceu-vos a la Redacció de "Kataluna Esperantisto"

ESTATUTS DE LA FEDERACIÓ ESPERANTISTA CATALANA

Art. 1. L'agrupació general d'esperantistes en terres de llengua catalana, es dirà FEDERACIÓ ESPERANTISTA CATALANA, i, en esperanto, KATALUNA ESPERANTISTA FEDERACIO (K. E. F.).

Art. 2. La finalitat de la Federació Esperantista Catalana, és la unió d'entitats i individus esperantistes en terres de llengua catalana per a la divulgació i propaganda de l'Esperanto, i, també, donar compliment als acords i Consells que afectin la collectivitat procedents dels Congressos Internacionals o dels nuclis directores de la llengua del doctor Zamenhof.

La Federació Esperantista Catalana, sempre que les circumstàncies econòmiques ho permetin, s'adherirà, pagant la quota corresponent, a la «Konstanta Reprezentantaro de Naciaj Societoj».

Art. 3. La Federació Esperantista Catalana estarà integrada de membres actius i protectors.

Per a la classificació dels actius, caldrà tenir en compte el que se segueix:

Els socis actius seran dividits en socis collectius i individuals.

Els socis actius pagaran, per mitjà de l'entitat llur i per cadascun dels socis que aquesta tingui, una quota de 0,30 ptes. trimestrals.

Els socis individuals que acreditin pertànyer a una entitat esperantista, no adherida a la Federació, pagaran solament una quota de 1'20 ptes. anuals.

Els socis individuals pagaran una quota de dues pessetes amb cinquanta cèntims anuals.

Els socis protectors (individus o entitats), pagaran una quota de 12 ptes. anuals amb un mínim (1).

Art. 4. La Federació Esperantista Catalana, estarà regida per una Junta responsable cada any, composta de: President, vice-President, Secretari, vice-Secretari, Caxer, Comptador, Bibliotecari i dos vocals.

Art. 5. La Junta de la Federació Esperantista Catalana convocarà, almenys un cop cada any, si és possible en diferents localitats, durant la primavera i en dia festiu, els seus associats en Assemblea o Congrés general, en el qual, previ l'ordre del dia, es donarà compte als federats dels treballs i gestions fets pel referit Comitè Directiu durant el temps del seu exercici; serà acordat, si és possible, el lloc on s'haurà de celebrar el pròxim Congrés o Assemblea; seran nomenats els individus que hauran de formar part de la Junta per al següent exercici i hom discutirà les proposicions que hagin estat presentades des 30 dies abans del Congrés o Assemblea, i, si és possible, que hagin estat publicades a la revista i incloses en l'ordre del dia.

Art. 6. La Junta permetrà la constitució de seccions dintre de la Federació. Aquestes seccions, que podran ésser de caràcter ben autònom, hauran de regir-se per un Reglament interior en el qual siguin cedit, com a mínim, dos càrrecs, en els corresponents Comitès de Secció, al Comitè Directiu de la Federació.

Art. 7. Tots els acords de les Assemblees o Congressos seran presos per majoria de vots dels socis assistents. Les modificacions que puguin ésser presentades a aquest Reglament, hauran d'ésser-ho amb l'antelació deguda a fi d'incloure-les en l'ordre del dia i estar publicades en la seva totalitat, puix que solament podran ésser discutides i establertes en les Assemblees o Congressos generals.

Art. 8. Tots els socis actius, individuals o collectius, tindran veu i vot en les assemblees o Congressos generals on assisteixen.

Art. 9. Aquesta Federació Esperantista Catalana podrà actuar mentre tingui adherides dues entitats o 30 membres individuals. En cas de dissolució, previ acord de la Federació Esperantista Catalana, els fons existents o que resultin de la liquidació, passaran a la «Internacia Centra Komitato de la Esperanto Movado» domiciliada a Ginebra per a la propaganda de l'Esperanto. Si aquesta entitat central no existia en els moments de la dissolució, podrà, la Junta General de socis, acordar la destinació dels fons objectes en existència.

Article transitori. La Federació Esperantista Catalana estarà domiciliada a Barcelona, carrer València, 245, entresol.

Barcelona, 6 d'agost del 1930.

(1) Tots els socis pagaran a més ptes. 1,25 anuals per la quota d'U. E. A